julio/aŭgusto 1966

NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio „La Estonto Estas Nia" - 31-a jara, n-ro 7/8

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

40 JARA NATURAMIKA ESPERANTO FAKGRUPO.

Ekzistas multaj fakgrupoj en la monda Esperantomovado, sed estas ankaŭ kelkaj Esperanto-fakgrupoj, kies bazaj organizoj ne estas esperantaj. Al tiuj maloftaj Esp. - fakgrupoj apartenas la „Turista Asocio la Naturamikoj" Esperantofako (T.A.N.E.F.) kies sukcesoj estas unikaj en la ne-esperantistaj internaciaj amasorganizoj. La granda naturamika internacia organizo nombras 365 mil membrojn kaj posedas 765 domojn kaj kabanojn en 16 landoj. Kiam ni foliumas en regiona Komunikilo de Vieno, aldono de la revuo „Naturfreund" (Naturamiko) nr. 21,1926, ni legas pri la decido de la TAN-landestraro, starigi Esperantofakgrupon en Vieno. La fondkunveno okazis laŭ la iniciatinto s-ro Klein, nuntempe vivanta en Montevideo, la 2-an de marto 1926. Kiel estro funkciis s-ro R. CECH, la nuna honorprezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio.

La fakgrupo nombris 92 membrojn, inter ili ankaŭ estis la nuna aŭstria ŝtata prezidanto Franz Jonas. La fervora laboro de la naturamikaj esperantistoj baldaŭ montris sukcesojn. Naturamikaj kaj esperantistaj revuoj raportis pri la agado de la naturamikaj esperantistoj.

Ankaŭ en Germanio kaj Svisio ekagis sacelanoj. Dum la faŝista tempo la naturamikaj esperantistoj kaŝe kunvenis en la rivera arbaro ĉe la Danubo (Lobaŭ) sub la gvidado de s-o. Nell, hodiaŭ vivanta en Usono, ĝis la naciistoj mutigis ĉiun internacian interkompreniĝon.

Ne perdiĝis la semeroj kaj denove post la milito ekkreskis kaŭze de la starigo de la Esperanto-fakgrupo en Vieno 1946, ankaŭ TANEF-sidejo en la Naturamika hejmo. En Anglio, Francio, Germanio, Nederlando kaj Svisio fervore ekagis fakreferantoj, kaj tiel estas kulturita la tereno al sukceso. Kelkaj elstaraj mejloŝtonoj sur la sukcesplena vojo estas menciindaj. En 1946 la kotizmarkoj de la naturamika internacio ricevis esperantan surskribon „La Naturamikoj". En 1951 eldono de la naturamika Esp.-revuo „LA MIGRANTO" kaj TANEF - Informilo por la kunlaborantoj. En 1953 dum la naturamika internacia kongreso en INSBRUCK starigo de provizora internacia komitato de la Esperantofako kun la sidejo en Antwerpeno. En 1956 oficiala agnosko de la Esperantofako dum la kongreso en Hamburgo.

La naturamikaj revuoj enhavas artikolojn en-kaj pri Esperanto, eĉ represas Esperantokursojn. La Naturamika Internacio kaj la landaj organizoj subtenas la celojn de la naturamikaj esperantistoj. TANEF organizas internaciajn feriajn restadojn, vojaĝojn, kunvenojn kaj skirestadojn. En

EL LA SEKCIOJ.

Jubilea Kunveno Sekcio Groningen.

La 4-an kaj la 5-an de junio la sekcio Groningen festis sian 40-jaran ekziston. Partoprenis 78 personoj.
En la pavilono de „Stadspark" okazis la oficiala akcepto. Inter la gratulantoj estis la urbestro de Groningen, s-ro J. J. Berger. La prezidanto dankis ĉiujn parolintojn, esperante „ke por ni ankaŭ validas la diro: „La vivo komenciĝas je la 40-a jaro".
Post la akcepto la ĉeestantoj promenis aŭ veturis al la instrucentro „Prof. Van der Leeuw", kie oni panmanĝis en bele ornamita salono. Alparolis la jubileantan sekcion s-ro Kervers nome de la ĉefestraro, f-ino Vermaas nome de U.E.A. kaj multaj aliaj. S-ro Meier parolis nome de la grupo el Bremen, memorigante la renkontiĝojn kun la sekcio Groningen, kiuj preskaŭ ĉiujare okazas. Li transdonis belegan fajencan sigelon.
Kiel lasta s-ro Holleman gratulis kaj donacis nome de la samklubanoj grandiozan donacon: projekciaparaton por diapozitivoj kaj projekciaparaton por filmoj kun ekrano. Granda surprizo!
Sekvis distra programo kun i.a. dialogo pri la historio de la sekcio, prezentita de f-ino Hovinga kaj s-ro De Vries: plue kantado fare de ĥoro, varia programo prezentita de la infancirko „Saranti" el Leeuwarden kaj fine balo ĝis meznokto.
Dimanĉon okazis ekskurso tra la agrikultura regiono de la provinco Groningen kun vizitoj al la iama farmbieno-kastelo „Menkemaborg" kaj al la farmbieno „Ekenstein".
Je la kvarono post la 17-a oni atingis Groningen, kie la gastigintoj adiaŭis multajn el la gastoj kaj la reston ĉe la instrucentro.

N. C. Kuiterman-van Goor.

---

landoj, kie ekzistas naturamika movado, funkcias Esp.-fakreferantoj. La lasta granda sukceso estis en 1965 dum la Internacia Naturamika Kongreso en Kopenhagen, kie en la novaj statutoj estis decidite subteni la internacian lingvon Esperanto.
Informon donas:
Turista Asocio „La Naturamikoj" Esperantofako Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien, Aŭstrio.

Sekcio Haarlem.
Sekr.: Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout.

La monato de majo estis la t.n. „Israelo" monato en la Haarlema klubo.
Nia prezidanto kun edzino vojaĝis en marto al tiu lando. Ili kune rakontis kaj montris diapozitivojn. La 12-an de majo s-ro Janssen rakontis ion pri Libano kaj Sirio, pri Bajrut kaj Damaskuso.
La 26-an de majo ni aŭskultis la prelegon pri Israelo mem. Pri la historio de la lando k.t.p. kaj vidis denove tre belajn diapozitivojn pri modernaj kaj malmodernaj konstruaĵoj, pri havenoj, la morta maro kaj ĉirkaŭaĵo kaj fine pri la dezerto kiu similas lunpejzaĝo. Sen iu kreskaĵo, same kiel en la regiono de la morta maro. La laboristoj, kiuj laboras tie, ne loĝas en la ĉirkaŭaĵo, sed ili vojaĝas ĉiutage eĉ pli ol 100 k.m. malproksimen.
Estas bedaŭrinde tro malmulte da spaco por pli detale rakonti pri tiuj du interesaj vesperoj. Sed la venontan jaron la U.K. estos en Israelo kaj vi povos vidi kaj travivi mem ĉion!

INAŬGURO DE MONUMENTO EN LEEUWARDEN.

La 15-an de decembro 1959 bela parko en la orienta parto de Leeuwarden ricevis de la urbestraro pro la 100-jara datreveno de la naskiĝtago de la aŭtoro de Esperanto la nomon Dr. Zamenhofparko.
La okulisto, kiu estis Dro. Zamenhof, troviĝas tie laŭprofesie en konvena loko, ĉar la Boerhaavestrato, Robert Kochstrato, Frederik Ruyschstrato kaj Pasteurvojo, rememorigantaj famajn medicinistojn, ĉirkaŭas la parkon.
En ĉi tiu grava publika ĝardeno, kiu intertempe estas plivastigita, sub la sama nomo, per bela lageto-tereno transvoje kaj kiu estas situanta en dense loĝata kaj ĉiam pli ampleksiĝanta urba kvartalo, aperos ĉi aŭtune moderna ornamento, en abstrakta stilo, farita el kupro kaj alta 3 metrojn. En ĝi la skulptisto, Tjeerd Visser (artejo Haudmare en Duurswoude, Frislando) volas esprimi la penon kaj streĉon por efektivigi idealon kaj la linion de la evoluo supren. La celo estas duflanka: La komunumo plibeligas per ĝi la urbon kaj la Frisa Esperantista Rondo konkretigas per ĝi — kaj pli speciale per la aldono de aro da krudaj naturŝtonoj el diversaj landoj kaj mondpartoj — la etoson de Esperanto. F.E.R. jam ricevis aŭ scias survoje la petitajn ŝtonojn. Esperanto-delegitoj kaj amikoj-Esperantistoj entuziasme kaj helpoprete reagis je ĝiaj petoj.
La inaŭguro de la ornamento estas definitive planita en la posttagmezo de la 24-a de septembro venonta, je kiu dato F.E.R. samtempe intencas festi sian 40-jaran jubileon. Komuna kafotablo kaj kelkaj distraĵoj sekvos en la vespero. La posta dimanĉo estos dediĉata al ekskurso en la provinco.
Publikigo kaj plidetaligo de la programo sekvos.

Sekcio Zaandam.
Sekr.: P. L. Takstraat 64.

La serio de niaj distraj kunvenoj je la unua lundvespero de ĉiu monato estis la sesan de junio interrompita per eksterordinara membrokunveno, kiu havis la intencon jam nun priparoli la propagandon por la kursoj de la estonta sezono. Fondiĝis kelkaj komitatoj, kiuj havas po apartan taskon. La komitatoj konsistas el jenaj geanoj: la samideaninoj Hammer, Schone kaj Wester kaj la samideanoj Beunder, Van Deijk, Driesten, Fortuin, Hammer kaj Vis. Siatempe la membroj estos informataj ĉu pere de apartaj cirkuleroj ĉu per nia klubo-gazeto „Sub la Verda Stelo".

PENTEKOSTA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN NORG

Kvardeko da esperantistoj venis sabaton, la 28-an de majo, 1966, al NORG en la provinco Drente por partopreni tie dum la pentekostaj tagoj esperantistan renkontiĝon. Ĉi tiun renkontiĝon iniciatis kaj organizis f-ino d-rino J. van Selms, loĝanta en la nomita vilaĝo.
La kunvenoj, kiuj okazis en bela salono de la moderna t.n. „dorpshuis" (= Vilaĝa Domo), pasis en agrabla, ne tro konvencia maniero. Ĝuste pro tio regis en ĉi tiu renkontiĝo dum tri tagoj ĉarma, amikeca etoso.
Mi ne mencios ĉiujn apartajn eventojn, nek kiuj plenumis ilin. Ĉiuj partoprenantoj plenumis tion, kion ili povis, por fari la interrenkonton kiel eble plej plaĉa.
Aparte menciendaj tamen estas la du promenadoj, el kiuj du oni povis partopreni laŭ propra elekto. Ambaŭ promenoj okazis sub kompetenta gvidado en la belega kàj kampara kàj arbara ĉirkaŭaĵo de Norg. Ĉi tio okazis dum la unua pentekosta tago. Je la dua la ĉefa evento estis aŭtobusa ekskurso al la vilaĝo Leek, kie ni vizitis la iaman biendomon „Nienoord", ĉirkaŭitan de belega malnova parko. En la biendomo kaj la konstruaĵoj, apartenantaj al ĝi, nun estas instalita veturil-muzeo. Tie ni rigardis multajn antikvajn veturilojn, el kiuj iuj havas grandan, eĉ mondhistorian, signifon. Revenante ni trapasis la vilaĝon Roden, kie ni trairis ankaŭ la Zamenhof-straton, kiu havas tiun nomon dank' al la aktiveco de nia tie loĝanta S-ano P. v.d. Velde.
Iom post la 17-a horo ni reatingis nian startejon, kio signifis la finiĝon de ĉi tiu esperantista renkontiĝo, kiu laŭ la sento de ĉiu partoprenanto tro rapide fariĝis pasintaĵo.
Fine mi rajtu laŭde mencii f-inon d-rinon Van Selms, kiu - estante ankoraŭ nova esperantistino - aŭdacis organizi ĉi tiun esperantistan renkontiĝon.

J. Th. de Goeij.

D-rino Van Selms intencas denove aranĝi semajnfinan kunvenon en la venonta jaro, kondiĉe ke ŝi ricevu sufiĉe frue, nepre antaŭ la fino de tiu ĉi jaro, petojn pri tia aranĝo. Ŝia adreso estas:

F-ino d-rino J. van Selms,
Donderseweg 6,
NORG (Dr.).

F.E.N.

S-ro A. M. D. Korff eksiĝis kiel sekretario de F.E.N. Lia anstataŭanto estas s-ro J. Ph. Punt. La sekretaria adreso de F.E.N. estas do nun: Kenaustraat 35, Utrecht.

Manuskriptoj por la septembra numero de „N.E." atingu la redakcion antaŭ la 10-a de aŭgusto. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tre klare skribitaj aŭ - prefere - tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.

Redaktoro.

TRA LA LIBRARO.

POR LA PACO IV. Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj. Eld. Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. Moskvo, 1966. 14 x 21 cm., multobligita prezo ne ind.

La 3-a volumo de tiu ĉi serio estis recenzita jam en „N.E." de novembro 1965. Multo, skribita pri la 3-a volumo, validas ankaŭ por la 4-a. Ĉi tiu volumo enhavas multajn informojn pri Sovetujo. Multaj el la poeziaĵoj ne estas altnivelaj. Sed kelkaj el la tradukoj de la baltaj lingvoj verŝajne konservas multon el la ĉarmo de la originalo.
La lingvaĵo ne estas bona. Koncerne la artikolon (konatan malfacilaĵon por slavoj!) mi trovis 22 erarojn sur 2 paĝoj.

W. A. V. v. T.

VETERANO?, artikolaro originale verkita en Esperanto fare de Ismael Gomes Braga. Eldonis Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilo. Formato 14 x 19 cm., bindita kun ora surpreso kaj arta polvkovrilo, 231 paĝoj. Prezo ne indikita.

La enhavo de ĉi tiu interesa verko certe ne estas klasifikebla sub belliteraturo, tamen ĝi prezentas bonegan legaĵon en simpla, plejofte senerara Esperanto. Inter multaj konkludaj frazoj oni ŝatus parkerigi iujn, kiuj similas sentencojn validantajn por ĉiuj fervoraj esperantistoj, kaj el kiuj mi citas jenajn.
Ni rigardu la mondkongresojn pri ekonomio, pri malarmado, pri ĉio, kaj ni konstatos ke la laboron devos fari ni mem, ne la tutmonda interkonsento de la registaroj;
Senpacienculoj ofte plendas ke nia marŝo estas malrapida:
malprava estas tia senpacienceco: ĉiuj spiritaj movadoj estas malrapidaj, postulas jarcentojn por efiki sur la homaro: kion scias la mondo pri Bahai movado, pri Oomoto, pri Kristana Scienco, pri Spiritismo? Ĉiu el tiuj movadoj transformis la tutan vivmanieron de milionoj da homoj: ili ĉiuj estas malpli junaj ol Esperanto, tamen neniu el ili estas tiel konata tra la mondo kiel nia lingvo internacia;
El tiuj konsideroj oni i.a. povas sperti ke ili venis el la plumo de ĝisosta kaj optimista esperantisto, laborante jarojn por progresigi la evoluadon de la internacia lingvo. Kaj tiel estas: la verkinto, Ismael Gomes Braga, apartenas al la kategorio de senlacaj esperantistoj, kiuj iom post iom, post stagnoj kaj progresoj, vidis evolui la disvastiĝon de Esperanto en sia lando, la respubliko Brazilo en Sud-Ameriko. En la jaro 1937 aperis la unua eldono de „Veterano?", tiam modesta broŝuro, tamen la unua libro en Esperanto originale verkita de brazilano kaj presita en Brazilo. En ĉi tiu dua eldono estas aldonita granda kolekto da mallongaj verkoj, publikigitaj en diversaj epokoj en kelkaj el la plej gravaj revuoj. Okaze de tiu novaperigo „kelkaj amikoj de Ismael Gomes Braga sin proponis mone helpi al ĉi tiu luksa eldono, kun la celo omaĝi la meritoplenan verkiston, kies tuta vivo konsistis en plej sindona admirinda laboro por Esperantismo".
Estis bonega, nun plenumita intenco.

P. M.

LA ESPERANTO-SOCIETO, 22-paĝa ilustrita broŝuro eldonita de la Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. Formato 17 x 22 cm., dense presita. Prezo f 1,50. Mendebla nur ĉe UEA.

Dum la jaro 1965 aperis en la revuo „Esperanto" serio da bonegaj artikoloj, verkitaj de estraranoj de UEA, celantaj instrui gvidantojn de lokaj grupoj kaj donantaj valorajn konsilojn por pliintensigi kaj plibonigi la poresperantan agadon. Jen UEA decidis denove publikigi tiun artikolaron, sed nun en unu broŝuro por ke ĉiu grupo povu havigi al si kompleta(j)n serio(j)n, por distribuo inter la lokaj fervoruloj. Al tiuj kiuj jam konatiĝis kun la koncernaj artikoloj, la broŝuro ne bezonas specialan rekomendon.
Al ĉiuj aliaj mi konsilas, se ĉiu grupo efektivigus nur parton el la prezentitaj ideoj, la loka movado povus certe rikolti sukcesojn. Aldonita estas ekzemplo de statuto por loka grupo sed, almenaŭ en Nederlando, por la aliĝintaj grupoj validas la statuto de la landa asocio. Grupgvidantoj, zorgu ke iu(j) ekzemplero(j) estu en viaj manoj, zorge pristudu kaj eluzu la enhavon. Via grupo (denove) ekfloros.

P. M.

SCIINDAĴOJ EL LA HISTORIO DE NIA ASOCIO (V)

Iom post iom komenciĝis periodo en nia lando, kiam ekfloris la movado kaj sekve la landaj asocioj. Aldoniĝis al tio diversaj faktoj, el kiuj estas menciindaj jenaj:

a. kelkaj esperantistoj el la neŭtrala kaj romkatolika grupoj en Nimego fondis en 1925 la „Centrale Esperanto Propaganda Commissie". Tiu privata entrepreno eldonis en la sekvaj jaroj (1926-1931) elstaran skriban kurson kaj sukcesis eĉ disaŭdigi ĝin antaŭ la mikrofono de la KRO-stacio, kie s-ro P. Heilker klarigis la lecionojn. Oni decidis fari grandegan reklamon, dissendis milojn da propagandaj folioj kaj entute akiris proks. 22500 kursanojn, kiuj certe ne ĉiuj finstudis, tamen montris sian intereson pri Esperanto;
b. la 19-an de novembro 1926 fondiĝis en Leeuwarden la Frisa Esperantista Rondo, kiu en postaj jaroj preskaŭ tute „verdigis" Frislandon. La ĉefa fervorulo tie estis s-ro P. Hendriks, kiu gvidis multajn kursojn, propagandis ĉie en la provinco kaj fondis entute 30 grupojn;
c. en 1927 la ministro pri instruado decidis nomi oficialan observanton en la Ekzamena Komitato;
d. la tiama „Federatie van Handels- en Kantoorbedienden Mercurius" aldonis al siaj prilingvaj ekzamenoj ankaŭ Esperanton (bedaŭrinde la esperantistaro ne montris interesiĝon; en proks. 4 jaroj partoprenis kaj akiris la komercan diplomon nur ĉirkaŭ 15 personoj, tiel ke la koncerna federacio ĉesis tiun ekzamenon);
e. du fervoraj amsterdamaj geanoj ĉie propagandis Esperanton en multaj lokoj: s-ro J. B. B. Dufrenne (mortis) kaj J. L. Mast. La unua tre sprite kaj elokvente paroladis, la dua montris siajn lumbildojn (i.a. pri la Univ. Kongreso en Nürnberg), kaj ankoraŭ ĝis la hodiaŭa tago aktive laboras kiel kasisto de la ĉefurba grupo;
f. laŭ invito de la Haga grupo, subtenita de la amsterdama sekcio kaj de la ĉefestraro de L.E.E.N. plus kelkaj privataj personoj, s-ro Andreo Cseh, la viro de la fama instrumetodo, venis al Nederlando fine de oktobro 1929; en postaj jaroj okazis multaj Csehmetodaj kursoj en diversaj lokoj de nia lando. En 1930 estis starigita la Internacia Cseh-Instiuto de Esperanto en Hago, kies laboroj kaj famo disvastiĝis tra la tuta mondo.

Intertempe la tri nederlandaj societoj organizis en 1926 kaj 1927 resp. la duan nederlandan Esperanto-kongreson en Nimego kaj la trian en Haarlem, kie s-ro E. de Wolf ludis gravan rolon.
Sekvo de la propagando de la Nimega komisiono estis, ke en la ekzamenoj partoprenis multaj personoj; ekzemple en la jaro 1927 anoncis sin 368 kandidatoj (326 por la A-ekzameno, 42 por la B-ekzameno), okazis ekzamenoj en 5 lokoj kaj en postaj jaroj la nombroj grave plialtiĝis. Je la unua de januaro 1928 oni restarigis gazetarservon, gvidatan de s-ro de Wolf; dum multaj jaroj ties ampleksaj raportoj aperis en la alternsemajna „Holanda Esperantisto". En la sama jaro L.E.E.N. eldonis presitan membroliston en broŝura formo, kompilitan de s-ro Donker; tiam nia asocio jam nombris 570 gemembrojn. Estis la jaro de la Olimpaj Ludoj en Amsterdamo. Tiuokaze L.E.E.N., post permeso de la P.T.T.-direkcio en Amsterdamo, presigis foliojn kun diverslingva rekomendo de Esperanto kaj aranĝita por surgluo kaj ŝtampado de la specialaj olimpaj poŝtmarkoj (ekzemplero troviĝas en la P.T.T.-muzeo). La poŝtisto s-ro Dufrenne forvendis en

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

Poŝtkonto 7 6 9 1 5.

la speciala oficejo ĉe la stadiono ĉ. 8600 foliojn, kaj tiel ne nur propagandis la internacian lingvon, sed ankaŭ favoris la P.T.T., ĉar la aĉetintoj plenigis la foliojn kun la tuta serio por siaj kolektoj. En 1928 la nederlandaj organizoj ne povis interkonsenti pri okazigo de nederlanda kongreso; nur en 1929 okazis la kvara nederlanda kongreso en Arnhem, en kiu nur L.E.E.N. kaj N.K. kunlaboris. Bedaŭrinde en postaj jaroj la landaj societoj en sia propaganda laboro tute disiĝis kaj ne plu kunlaboris en kongresoj. Tial L.E.E.N. memstare depost 1933 daŭrigis la serion da nederlandaj kongresoj.
En la jaro 1930 nia asocio nombris jam 23 grupojn kun entute 1184 sekciaj kaj ĝeneralaj geanoj, plus 17 junuloj kaj 118 donacantoj. Je la unua de septembro okazis grava jarkunveno en Zwolle, kie oni priparolis la organizan formon de la asocio. Oni (re)elektis jenajn estraranojn: H. J. Blokker, prezidanto; H. S. Donker, unua sekr.; P. M. Mabesoone, dua sekr.; s-ino Wensel-Venster, kasistino; f-ino C. Offerhaus, Hago, dua kasistino.
Jam en 1928 L.E.E.N. eldonis broŝuron „Waarom Esperanto op de Lagere School?", tiel instigante al enkonduko en la elementajn lernejojn. Sama ideo kompreneble ankaŭ vivis ĉe la aliaj organizoj. Oni interrilatis kun diversaj instruistaj asocioj kaj sekve de tio fondiĝis je la 14-a de junio 1930 en Amsterdamo la Komitato por Enkonduko de Esperanto en la Lernejoj (mallonge nomita: Ondespkomitato), kies unua gvida estraro formiĝis el: P. Krijt (FLE) prezidanto; P. M. Mabesoone (LEEN) sekretario. Krome en la komitato ĉeestis reprezentantoj de N.K. kaj kelkaj instruistaj organizoj; speciale menciinda estas la reprezentanto de la tiama Bond v. Ned. Onderwijzers, la literaturisto Theo Thijssen, kies instigaj paroloj multe influis la agadon de la komitato, precipe ankaŭ ĉar li estis membro de la Dua Ĉambro en la parlamento. Jam la 9-an de majo 1932 tiu komitato sendis petskribon al la tiama ministro pri instruado, por akceptigi Esperanton inter la fakultativaj fakoj de art. 2 de la Instrua Leĝo. Sed fine de majo la ministro malfavore respondis.

(daŭrigota) **P. M. Mabesoone.**

La antaŭaj partoj aperis sinsekve en „N.E." (1966) de marto (I), aprilo (II), majo (III) kaj junio (IV).

SAMTEMPAJ SEZONOJ

Memoru, kara, jam aŭtuno estis,
Heroldis vento pri la vintra dormo,
La nudajn branĉojn blanka prujno vestis,
La birdoj mutis pro la frosta morno,
Sed . . . ni neglekte ĉion en ekstero
Sur benko sidis, ridis sinforgese;
En ni la majan revon pri l' somero
Inspire amo teksis multpromese . . .
Ni havis for de l' trista nuno
printempon nur en la aŭtuno.

Rigardu, kara, ĉerizarboj floras,
orumas verdan boskon suno maja,
la vintra morno jam delonge foras,
pri juno kimnas birdotrilo gaja,
sed . . . ni senvorte sidas sur la benko,
tra florperdinta kampo pense vagas
kaj ĉesis jam obstini pri la venko,
por trokuraĝo per rezigno pagas . . .
Jes, samas bildoj, sonoj;
nur lokon ŝanĝis du sezonoj.

Julio Baghy.

Tiun ĉi speciale por la Haga sekcio okaze de ĝia 60-jara jubileo faritan poemon ni bedaŭrinde pro manko de loko ne povis jam presigi en la maja numero de „N.E.".

AFORISMOJ

Armand Su.

Pli bona estas la amara vero
ol la mensog' volvita en mielo.

In' kun cerb' malplena sen viv-tasko,
sin okupas nur pri l'ido-nasko.

Oni ne taksu verkon laŭ aŭtoro,
sed laŭ enhavo kaj ties valoro.

Por vivo sole amo ne sufiĉas,
la ĉiutaga pan' antaŭkondiĉas.

Homo iĝas saĝa nur dank' al eraroj,
al amaraj spertoj kaj stultegaj faroj.

KONCIZE

„La Faraono" de Boleslaw Prus filmita.

Dum la filmfestivalo en Cannes en majo de tiu ĉi jaro oni prezentis la polan filmon „Faraon" de la reĝisoro Jerzy Kawalerowics. La rakonto estas pruntita el la samnoma romano de la pola verkisto Boleslaw Prus* (1847-1912) pri la vanaj klopodoj de la juna Ramses XIII enkonduki sociajn reformojn por sia popolo kaj restarigi la potencon de Egiptujo.
La verko aperis en 1907 ĉe Hachette (Parizo) en Esperanto-traduko fare de la konata pola tradukisto Kabe (=Kazimierz Bein).
Kompetentuloj nomas ĉi tiun verkon modelo pri Esperanto-stilo. Ĝi ankoraŭ ĉiam estas tre leginda klasikaĵo el la en Esperanto tradukita literaturo.

---

* pseŭdomino de Aleksandr Glowacki.

Veturantaj Instrumaŝinoj.

Sukces-kvocienton de 90% atingis 500 studentoj, kiuj finis kursojn en transportebla permaŝina lernejo, kiu vizitis 12 lokojn en Britujo. La komparebla kvociento de kursoj per normalaj instrumetodoj estas nur 50%. La veturilo, ekipita per brite fabrikataj instrumaŝinoj de 16 diversaj specoj, vizitis teknikajn, komercajn kaj plenaĝulajn lernejojn. La ekipaĵo inkluzivis instrumaŝinojn por individuoj kaj por grupoj, por lingvo-instruo kaj por legado.
(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Slovenia popolfabelo eldonita kiel bildstrio.

En 1954 eldoniĝis ĉe Eldona Sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo (Ljubljana, Jugoslavio) la popolfabelo „Martin Krpan" rakontita de Fran Levstik (1831 - 1887), kun belaj tutpaĝaj ilustraĵoj de Tone Kralj.
Martin Krpan, nomo de la giganta heroo en la fabelo, reprezentas popolon, kiu per sia ruzeco ofte superas la registarajn fortojn, kvankam tiuj ĉi disponas pri pli grandaj materiaj rimedoj.
Laŭ sugesto de s-ro Slot, Zeist, la entrepreno „FIBO-Beeldonderwijs" (FIBO-Perbilda Instruado) faris laŭ la ilustraĵoj de Tone Kralj serion da bildoj (filmstrion) por instruado en la (elementaj) lernejoj.
La eldonisto en Ljubljana volonte konsentis, kondiĉe ke ĉe ĉiu prezentado estu menciate, ke la traduko okazis pere de Esperanto.
La strio estas eldonita kiel n-ro 214, kostas po gld. 12,50, kaj povas esti mendata ĉe „FIBO-Beeldonderwijs", Utrechtseweg 66, ZEIST (Nederlando).

(Vidu ankaŭ „N.E." de dec. 1965, pĝ. 109).

Kosma Trafiko.

Daniel J. Fink, de la Usona ministerio de Nacia Defendo, dum simpozio pri la venonta kosma trafiko, i.a. antaŭdiris kunmetadon de normlingvo, tiel ke ĉiuj satelitoj povos interkomunikadi (Vrije Volk, 23 marto 1966).

LIBROTENIST(IN)O SERĈATA!
EN LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.

estas loko por lerta juna oficist(in)o, bone reganta Esperanton parole kaj skribe, kun kompententeco pri librotenado, konanta trakopian librotenan sistemon per maŝino.

Leteroj kun informoj pri instruiteco, antaŭaj oficoj, aĝo, rekomendoj, dezirata salajro ktp al la Direktorino de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

NED. ESPERANTISTEN-VERENIGING „LA ESTONTO ESTAS NIA"

Pres.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.
Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.
Tel.: 0 70 - 66 96 69. (post 1-9-1966).

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Gazetarservo: Frederikslaan 47, Schoorl (N.-H.).

Anoncoj: Anonctarifoj laŭ peto haveblaj ĉe la kasistino.

Informa Fako: S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem.

Esperanto agnoskita kiel liturgia lingvo.

La Katolika Esperanto-Centro en Romo komunikis, ke Esperanto oficiale estas permesita kiel liturgia lingvo en la Sankta Meso.

Esperanto en praktikon!

Ĵus aperis multkolora teknika prospekto, ekipita per multaj fotografaĵoj. Tiu ĉi prospekto temas pri ceramika maŝinaro, sanitara ceramikaĵo, ceramikaj produktejoj kaj elektro-porcelano fabrikataj en Ĉeĥoslovakio.
Interesuloj povas ricevi ĝin kontraŭ rekompenco libervola.
Bonvolu skribi al la jena adreso:

ZK Esperanto
Prerovské strojírny
Prerov - Ĉeĥoslovakio.

„Mia vojaĝo en Esperantujo".

Grandan sukceson havas en Japanujo la japanlingva libro „Esperanto-koku Ŝuujuuki" (Mia vojaĝo en Esperantujo), verkita de s-ro Kjotaro Deguĉi surbaze de liaj spertoj dum la per-Esperanta vojaĝo kun lia amiko Yoŝimi Umeda en 1963 tra Eŭropo kaj Usono.
La verko aperis kiel la 9-a volumo de la „Asahi Aventura Serio", eldono de Asahi Ŝinbun, unu el la tri plej grandaj ĵurnalejoj en Japanujo.
Dum kelkaj monatoj ekde la debuto la 200-paĝa verko daŭre okupis la unuan lokon en ĉiu gazetara enketo pri ĉi-semaj naj libroj plej bone disvendataj". Ĉe la jarfino de 1965 la eldonnombro jam atingis 50.000 ekzemplerojn.

Septembra Kunveno sur Tekselo.

Ni memorigas pri la Norda-Stelo-Tago sur Tekselo, la 18-an de septembro.
Vidu la junian numeron.

SKRIBA KURSO POR LA E-DIPLOMO

en kunlaboro kun la

Leidse Onderwijs Instellingen

Informoj kaj aliĝoj nur pere de nia sekretariino:

S-ino J. C. Heetkamp-Senstius,
Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

SUBTENU LA MABESOONE-FONDAĴON!

Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen. Poŝtĝirkonto: 81 58 89.